



ORIENTA STELO

Februaro 2015



Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932

Kontaktdetaloj

Roy Threadgold	Prezidanto	01371850481
Roy Simmons	Sekretario	01473461346
Barrie Murphy	Kasisto	01702472193
Mark Drake	Komitatano	02085188094

roy@boydellsdairy.co.uk
rokeby@globalnet.co.uk
celiaandbarrie@tiscali.co.uk
marko.drejko@gmail.com

Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue kun koloraj bildoj, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.



Antaŭkristnaska Kunveno en Braintree

La 29an de novembro kunvenis dek unu federacianoj en St Michael's Church House, Braintree.

La tago komencis per la kutima vigla gramatika diskuto kiun estris Barrie.

La promeno sekvis vojeton (iomete kotan) laŭ la rivero Brain ĝis la butikumejo Freeport, kaj ree per la senpaga aŭtobuso.

Intertempe Roy S. prepares ampleksan

lunĉon por revivigi nin.

Terry Page prezentis prelegon titolita "Kiel esti MISkomprenata en Esperanto" - ĉu intence ĉu senintence.

Dudeko da saketoj provizis problemon (vidi foton) diveni ties enhavaĵojn nur per palpado kaj Roy T. prezentis mensotordigan bildan kvizon verkita de Roy S.

Jarkunveno

**Braintree, St Michael's Church
House**

Sabaton la 14an de marto

1100 ĝis 1700

Tagmono £5

Ludoj, prelego, baznivela gramatik-instruado,
babilado ktp.

Ĉiuj bonvenaj, el kiu ajn lingvo-nivelo.

AGM

**St Michael's Church House,
Braintree**

Saturday 14th March

1100-1700

Day money £5

Games, talk, basic level grammar instruction,
chat etc.

All welcome, whatever your language level.

IF TRAVELLING BY TRAIN

Buses are replacing trains over much of the region. Coming from Liverpool St. would involve train to Billericay, Bus to Witham, Bus to Braintree. Please contact a committee member to see if we can help with transport from a station that is operating.

Via Federacio bezonas vin! Helpu nin.

Pro luproblemoj, ni denove kunvenos en Braintree ĉi foje, sed la luprezado de la halo multobligas nun. Ni vere bezonas ne tromultekostan halon por niaj renkontiĝoj. **Via komitato petas al ĉiu grupo aŭ individuo enketi pri la ebleco lui halon en via najbarejo je taŭga prezo (£30 pli-malpli).** Se ni povus havi liston, tio helpus aranĝi kunvenojn diversloke – espereble konvenajn al niaj lokaj grupoj.

Nia ĉefa problem tamen estas la manko de homoj kiuj pretas vojaĝi al niaj kunvenoj. La ĉeestantaro ŝrumpiĝas dum multaj jaroj. Kiom estas la decidiga numero por la daŭrigo de la Federacio? Ĉu ni ŝanĝu nian tradiciajn kutimojn? Se ni daŭre kunvenus, ĉu iu (vi) venus?

Ĉu vi kongresos ĉi-jare?

La 96a Brita Kongreso okazos la 17a – 19a de aprilo en la Jubilee Library, Brighton. Bedaŭrinde malmulte el nia regiono kutime ĉeestas la kongreson, sed Brighton ne estas tro longe for de ni. Do pripensu ĉu eblus rezervi tiun semajnfinojn kaj ĝui la aeron apud la maro. Detaloj kaj aliĝilo troviĝas ĉe <http://britakongreso.org/>

-Ankaŭ-

Ne forgesu ke la ĉi-jara Universala Kongreso, kiu estos la 100a, okazos ne tro longe for de ni – en Lille, Francio; ĝi okazos ek de 25a de julio ĝis 1a de aŭgusto

Facile atingebla de Londono en 90 minutoj per “Eurostar”, jen mirinda ŝanco, aparte se vi neniam antaŭe ĉeestis UK-on. Kontrolu la retejon: <http://www.lve-esperanto.org/lille2015/>

Vivi en vera Esperantujo dum la tuta semajno estas sperto neforgesebla.

Jam aliĝis preskaŭ 2,000 personoj el 68 landoj. Ĉu vi ankaŭ?



Ripetu rapide

Al la apartamento parte apartenas aparta portaparato.
Kiu kuiras keksojn kuirejen?